**Zamenhof-Festo, dimanĉon la 14-an de decembro 2025 en Ste-Gemmes-sur-Loire (49130,** sud-**najbare al Angers)**

Jen la planita programo :

=> 9h30 Akcepto en "salle du Hutreau" (vidu la ĉi-kunan mapon), kafo/teo, biskvitoj...

=> 10h ***"Esperantaj spertoj en muzik-festivaloj"*** (David Guérin).

=> 11h ***"Vin invitas la plac-dancado"*** (XiaoXiao).

=> 12h ***"Turdiono kaj kantanta aperitivo"***

=> Tagmanĝo surloke : menuo A (salato "*fraîcheur océane*" kun fumaĵita salmaĵo kaj senŝelaj tomatoj + kuskuso + ĉokoladŝaŭmaĵo) aŭ menuo B (vegana - menueroj ne findeciditaj).

=> 14h **La kantistoj kaj muzikistoj Victoria Dubin kaj Gérard Houitte (bekfluto, akordiono, gitaro) muzikos kaj dancigos nin per cirklo-dancoj, ktp.**

=> 16h30 **Ĝis baldaŭ !**

Dum la paŭzoj : brokantado de Esperanto-libroj kaj -gazetoj. La liston vi povas vidi en la retejo de Espéranto-Angers : mendu jam nun mesaĝante al biblioteko@esperanto-angers.fr. Tiel vi povos ricevi via(j)n libro(j)n dum tiu Zamenhof-Festo.

**La loko :** Mapo estas alkroĉita al la nuna mesaĝo. Bone notu, ke la evento okazos en la "salle du Hutreau", **ne en Angers** mem **sed en najbara urbo Sainte-Gemmes-sur-Loire** (poŝta kodo : 49130), pli precize "norde de Sainte-Gemmes kaj sude de Angers", tre proksime al la suda parto de Angers.

Preciza situo estas : 47.43561601280656, -0.5598910787150189
La distanco inter la SNCF-stacio de Angers kaj la "salle du Hutreau" estas 4,7 kilometroj. Sed per tramo, vi povas iri ĝis la fina stacio (en la kvartalo Roseraie) kaj restas nur 1,5 km. Se vi bezonas veturigadon, ne hezitu kontakti nin.

▶ La **prezo** estas **30 eŭroj** por la tuta tago : prelegoj, dancado, manĝ(et)oj, ...
▶ **Limdato por aliĝi estas la 30-a de novembro.**
Informoj aperas ankaŭ sur tiu paĝo, kie certe en la venontaj semajnoj aperos ĝisdatigoj kaj kompletigoj.
*Grave :* *por helpi al bona organizado,* ***bonvolu plej baldaŭ aliĝi ! Eĉ tuj por ne forgesi !***

Bonvolu trovi ĉi-sube la dokumenton por aliĝi.
==========================================
Propra nomo : ...................... Familia nomo : ...................... Telefon-numero : .............................

**Se alia(j) partoprenonto(j), simile :**
Propra nomo : ...................... Familia nomo : ...................... Telefon-numero :

.............................

Propra nomo : ......................   Familia nomo : ...................... Telefon-numero : .............................

Retpoŝt-adreso : ............................................@..............................................

Mi (Ni) partoprenos en la Zamenhof-Festo dimanĉon la 14-an de decembro 2025, en Sainte-Gemmes-sur-Loire (najbara al Angers)

Mi (Ni) elektas la **menuon** :   **A** :  ... persono(j)  ---------   **B** :  ... persono(j)

Prezo 30 €  x  ..... persono(j)  =  ..... €

========================================

**Bonvolu sendi tiun sumon** prefereble per ĝiro al la IBAN-konto: FR61 2004 1010 1100 2907 9S03 251 **ĝis la 30-a de novembro 2025**.

kaj sendi la aliĝilon papere al : Espéranto-Angers, 3 allée du Haras, Appt 132, 49100 ANGERS

aŭ rete al :  info@esperanto-angers.fr

Ankaŭ eblas aliĝi/pagi per ĉeko (profite al "*ESPÉRANTO-ANGERS*") uzante la saman adreson : Espéranto-Angers, 3 allée du Haras, Appt 132, 49100 ANGERS

============================================

----